FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto-Bulteno

**BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO**

**N° 34 a (nova serio) - N° 119 a - Decembro 1975**

**Prizorgas :** Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN .

**Eldonita de :** la ESPERANTO - Grupoj de la Ruena Regiono .

**Sendu la manuskriptojn antaŭ la :** 10a de februaro - 10a de majo - 10a de aŭgusto - 10a de novembro -

**UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE :** c.c.p. : ROUEN 283 40 H .

**Kotizoj :** Por 1976 : Minimuma kotizo : 5,00 Fr. Subtenkotizo ek de 10,00 Fr.
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 5,00 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "


# KIEL FARTAS NIA UNUIĜO ?

Eksterregionano kiu ricevas nian bultenon, eble havas impreson ke la esperantista movado estas tre vigla en nia regiono. La bulteno de U.N.E. fariĝis ja pli belaspekta, la enhavo estas pli interesa kaj la informoj pli multaj : mi rememorigas al vi la diversajn informrubrikojn : " Turisma Kalendaro, Studlibroj, Studdisdoj, Radioel--sendoj," ktp... Legante la bultenon, ĉiu povas konstati ke la estraro kunvenas ofte kaj regule. La estraro pristudis novajn statutojn, kiuj estis akceptitaj dum la ĝenerala kun--veno; ĝi ankaŭ kompilis adresaron de esperantistoj loĝantaj en nia provinco.

Komence, ni sendis la bultenon al ĉiuj adresoj sed iom post iom ni devis forstreki kelkajn nomojn de personoj kiuj malaperis aŭ informis nin pri sia nein--tereso. Lastan monaton, ni decidis ne plu sendi bultenon al tiuj kiuj ne pagis sian kotizon, krom novaj lernintoj kaj esceptuloj. Nun ni povas pli klare vidi kiel fartas la esperantistaro en Normandio. Ni povas diri ke ĝi estas kapo sen korpo. La anoj ne estas multnombraj. Mankas la aktivuloj. La membroj estas pli kaj pli maljunaj. Nova san--go ne envenas en niajn vejnojn. La gejunuloj ne interesiĝas pri nia lingvo. Malmultaj estas la grupoj kiuj kunvenas regule. Se tio povas konsoli nin, ni diru ke estas same por ĉiuj aliaj kulturaj asocioj. Ritmo de moderna vivo, televido, stultigaj distraĵoj favorigas apation kaj kontraŭas niajn klopodojn.

Pri tio bone konscias la estraro de U.N.E.. Ni devas streĉi niajn fortojn por propagandi, informadi. Sed propagando valoras kondiĉe ke estu eble malfermi kurson. Ne utilas propagandi en iu urbeto se mankas la instruonto. Ĉiu kompetenta espe--rantisto devas fariĝi kursogvidanto. Ni devas multobligi ĉie la kursojn.

.../...

# BONVOLU RICEVI NIAJN PLEJ VARMAJN BONDEZIROJN POR 76

Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais . DEPOT LEGAL : 3 e Trimestre 1975
.Le gérant : P. LEMARCHAND.

.../... La estraro de U.N.E. estas preta helpi iun ajn esperantiston kiu bezonas helpon por informadi antaù malfermo de kurso. Nur tiel ni povos supervenki apation kaj progresigi nian idealon.

Al ĉiuj, nome de la estraro, mi deziras feliĉan novan jaron.
Ke la jaro 1976 favorigu nian lingvon.

La Prezidanto : Petro KIJO.

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

# RAPORTO Estrara Kunsido de U.N.E.

LE HAVRE (29an de novembro 1975a) : La estraro kunvenis ĉe Gesoj GIBAUX en le Havre.
Ĉeestis : Sroj QUILLAUD, LEMARCHAND, GIBAUX, HUET kaj POTTIER.
Sroj DELAUNAY, GUERRE, JOUIS estis senkulpigitaj.
La kunveno malfermiĝis je la 14h30 kaj diskutis pri la jenaj punktoj :

Leĝpropono : El 27 deputitoj, nur 5 respondis al la letero kaj informbroŝuroj senditaj de U.N.E., sed favore : Sroj LARUE, DUROMEA, RUFENACHT, MEXANDEAU, DARINOT. En YVETOT, la grupo atendas rendevuon kun la deputito aù lia sekretario. U.N.E. sendos revokan leteron al la deputitoj kiuj ne respondis ĝis nun.

Bulteno : Krom kelkaj teknikaj malperfektaĵoj, la lasta numero ŝajnas tre bona. Tamen la listo de la "Kapableculoj" estas nekompleta. SAT-Amikaro tre favore raportis pri la 30a numero de la bulteno.

Adresaro : La estraro laboris al ĝia ĝisdatigo.

Kaso : Ĝi baldaù ricevos pli ol 400 Fr apartenintaj al la grupo en SOTTEVILLE.

Kunveno en St VALERY : Tiam jam 18 personoj aliĝis. Gesoj QUILLAUD zorgos pri la manĝoj.

Venonta kongresloko : Sro GIBAUX skribis al Sro ROUSSEAU en CAEN, por peti, ĉu li bonvolus organizi kongreson, sed ankoraù ne ricevis respondon.

Pikniko : Ni provos organizi piknikon en PENNEDEPIE dum majo. Sro QUILLAUD skribos tien, kaj la estraro povos vojaĝi tien eventuale por vidi la lokon.

Diversaĵoj : Sro GUILLAUME sendis al Sro GIBAUX adreson de angla grupo kiu deziras ĝemeliĝon : bonvolu skribi al : Sro STEPHENSON 2 Shagbrook Cottages
Buckland Road - REIGATE ( Surrey ) .

# VENONTA ESTRARA KUNVENO

Ĝi okazos la 14an de februaro 76 je la 14a horo ĉe Gesoj LEMARCHAND en ROUEN. Ni tutkore akceptos vin !

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

# KASRAPORTO

Laù informoj de nia ĉiam agema kasisto Sro JOUIS, je la 16 a de januaro 76a estis 1169,21 Fr en la kaso.
La Zamenhofa renkontiĝo en St VALERY permesis profiton de 383,32 Fr ! La grupo de Rouen - Sotteville baldaù ĝiros al nia poŝtĉekkonto pli ol 400 Fr. :
Ni komencas la novan jaron per pozitiva bilancon ! Tamen ne forgesu pagi vian jaran kotizon al U.N.E., farante tion rapide, vi helpos nin. Antaùdankojn !

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

K A P A B L E C U L O J :

Ni ricevis kelkajn informojn por kompletigi nian sliparon pri la personoj kiuj havas la instru-diplomon : "Kapableco". Listo jam aperis en la lasta numero de N.E.B. paĝo 4a.
Bonvolu aldoni al tiu listo :

en BOISGUILLAUME : Sro JOUIS.
FECAMP : Sro PERMANNE.
LE HAVRE : Sro HUET.

o-o-o-o-o-o-o-o

# NI LEGIS

en la oktobra numero de SAT - AMIKARO, n°309 :

**Normanda Esperanto-Bulteno** (Union des Espérantistes de Normandie - Maryse kaj Pierre Lemarchand, 43, rue Desseaux, 76100 Rouen), n-ro 30, Decembro 1974 : jen inteligenta bulteno, « ni devas esperi, ke nia unuiĝo fariĝos pli kaj pli efika kaj sukcesós veki la energion de ĉiuj esperantistoj en nia provinco » skribas Petro Quillaud en siaj bondeziroj; sendube li sukcesos; Unuiĝo ne estas falsa vorto por tiu « U.N.E. »; ne estas « malamikaj fratoj »; jen la adreso de U.F.E., jen la adresoj de F.E.T. kaj de SAT-Amikaro; ankaŭ la kristanojn, la skoltojn oni ne forgesas; en ĉi tiu numero estas tri praktikaj klaraj tabeloj, « Radio-elsendoj », « Turisma kalendaro » kaj « Livres d'études actuellement en vente ».

3 **ĜENERALA KUNVENO** : Ĝi okazis la 18an de Oktobro .Pro malsano, nia Prezidantino ne povis ĉe-esti ,kaj ŝia morala raporto estis legata . El ĝi oni eltiras kelkajn punktojn pri la vivo de la Grupo dum la jaro ...

Membraro : spite al la energio de nia amiko Chalm, kiu zorgis sole pri la du kursoj, novaj membroj malmultas. Oni devas tamen gratuli la membrojn pro la bona vizitado de la monataj kunvenoj , kies programo konsistas el Informoj , Paroladetoj kaj Gramatika aŭ Distra parto .

Val de Saâne : kontentiga proporcio de membroj vojaĝis kaj partoprenis je simpatia renkontiĝo de U.N.E.

Greziliono : kelkaj Havranoj kùnestis semajnfinan aranĝon ,kaj eĉ ĉe-estis la malferman kunvenon de la Kongreso de U.F.E.

Grupaj Festoj : Se oni povas bedaŭri la mankon de komuna aranĝo aŭ festo por la Grupo ĉi-jare, estas nedubeble ke la evento de la jaro estis la vojaĝo al Southampton por 13 Havranoj : Entuziasmiga estis tiu vizito al nia "ĝemelita urbo " . Akceptitaj ĉe esperantistoj, la Havranoj povis konstati ke oni pli bone interkompreniĝas ol oni povis supozi laŭ la provo per sonbendoj... La programo,lerte aranĝita, ne lasis multan tempon por spiri, kaj la gastigantoj ne volis ke ni havu la impreson ke manĝaĵo ne abundas en Anglio ! La bonvenigaj vortoj de la Urbestro , en Esperanto , estis en si mem bona aŭguro pri la maniero kiel disvolviĝis la oficiala akcepto : seprotokola kaj simpatia . La lunĉon prezidis la Urbestro , kun ĉe-esto de Parlamentano .Ni notu ke la Direktoro de " The Technical College" aŭtoro de poemojn en Esperanto, donacis al nia Grupo ekzempleron de sia poemaro. Alia Parlamentano ĉe estis la Kluba Vesperaĵo. Konklude, sukcesa eksperimento, refarenda .

Leĝpropono : En tiu grava afero, la membroj kontaktas individue siajn deputitojn kaj influajn instancojn.Okaze de nia vizito al la Urbestro - Deputito, pri nia vojaĝo al Southampton , ni atentigis tiun Parlamentanon pri tiu afero ... Li ĝin studos favore... La Grupa kaso partoprenos en la buĝeto de U.N.E. pri la kampanjo de informo al la Normandiaj Parlamentanoj.

Balotado : La tuta Komitato de la Grupo estis reelektita ; oni nomis plian membron : S-ino Janine SERY .

**KOMITATA KUNVENO** okazis la 28an de Oktobro ĉe S-ro Chalm . Pro malsano, S-ino Peltier eksiĝas el la prezidanta posteno . S-ro Gibaux akceptas provizore tiun postenon ; S-ino Peltier fariĝas vic-prezidantinon . La stukturo de la Komitato estas jena : Prezidanto = S-ro Gibaux ; Vic-prezidantino = S-ino Peltier ; Sekretariino = S-ino Turmel ; Helpsekretariino =S-ino Sery ; Kasistino = S-ino Langlois Membroj = Ges-oj Caron, Chalm, Laney, Lucas, Mercier .


Kursoj : ĉe M J C ĉiujaŭde 19h 30 ( unuagrada )
ĉe Liceo Porte Océane ĉiuvendrede 19h ( perfektiga,konverscia)
ambaŭ gvidataj de S-ro Chalm.
Aliparte, S-ino Sery instruas hejme al lernantino.

Monataj Kunvenoj ĉefaj eroj de la programo :

15.11.75 = S-ino Sery : " Esperanto Kial ? " 17h00 ĉe François 1er
20.12.75 = S-ino Lucas - - " -
17.01.76 = S-ro P.Mary : " Portugalio " 16h30 ĉe M .J . C .
21.02.76 = Jara Festo de l'Grupo " Kampara Bufedo kaj Vesperaĵo "
Salle des Fêtes de Sanvic .
20.03.76= F-ino Sylvie Caron " Eksterhomaj strangaĵoj " 17h00 ĉe François 1er

Southampton-anoj : akcepto en Le Havre de niaj geamikoj dum Septembro .

**NIA VIVO EN ...**



**LE HAVRE**

.... Ĉiam pri LE HAVRE :

Sur la antaŭa paĝo, vi povis legi en la ĉapitro Monataj Kunvenoj ke, la 21 an de februaro okazos la jara Festo de la Grupo : oni atentigas nin ke tiu loka festo ne estas rezervita nur al Havranoj ! Ĉiuj estas bonvenaj ! Konigu vian intencon ĉeesti al Sro Jean GIBAUX 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE.
Tiu evento lokiĝos en "La Salle des Fêtes de Sanvic" (malantaŭa korto de la Sanvic'a Urbo--domo). Ĝi okazos sabaton vespere , komenciĝos je la 19a horo per komuna vespermanĝo, sekvata de Varietea Vespero kun prestidigito, teatro, muziko, ktp, ktp;;;;
Oni antaŭpensas pri loĝigo de personoj dezirantaj tranokti en LE HAVRE.

# Le Groupe Esperanto du Havre — reçu à Southampton

Artikolo el Le Havre Libre kiu aperis la 30an 10 - 1975

Bedaŭrinde pro teknikaj kialoj ni ne povas prezenti al vi la foton kiu aperis kune kun tiu ĉi artikolo Ni petas senkulpigon ! Dankon !

(ndlr)

**Notre photo : de gauche à droite, lors de la réception en l'Hôtel de Ville de Southampton : M. A. DIAZ, président du Groupe Esperanto de Southampton ; Mme GOULD ; Mme PUGH, maire de Southampton ; M. Jean GIBEAUX, président du Groupe Esperanto du Havre et M. BRYEN, FIELD, directeur du Technical Collège.**

Via sano ! A votre santé !

Une délégation d'une quinzaine de membres du Groupe du Havre pour l'Espéranto s'est rendue récemment à Southampton sur invitation de la ville jumelle.

Reçus par le maire, Mme Pugh, qui leur a fait la surprise de leur souhaiter la bienvenue en espéranto, les Havrais lui ont transmis le message de M. Duroméa, maire du Havre, qui, mettant l'accent sur l'amitié entre les peuples, symbolisait par là même l'esprit du voyage.

Retrouvailles pour les uns, nouveaux amis pour les autres, les conversations allaient bon train lors des différentes parties du programme.

La soirée de cabaret, où il fut répondu aux chants traduits de l'anglais par « Mia Normandio », et à l'humour britannique par des jeux de mots « à la française », le numéro de l'illusionniste havrais... autant de choses prouvant une fois de plus, s'il en était besoin, la vie de l'espéranto, ce qu'a constaté un parlementaire présent à cette soirée.

Si les échanges se poursuivent sur le plan individuel et familial, les Espérantistes Havrais comptent bien recevoir leur amis anglais l'an prochain !

## YVETOT

AGADRAPORTO PRI YVETOT :

La grupo havis sian Ĝeneralan Kunvenon la 30an de oktobro 75 vespere.
La estraro nun konsistas jene :
Prezidanto : Sro HIS. Vicprezidanto : Sro POTTIER, Sekretariino : Sino POTTIER, Kasisto : Sro SAUNIER, Delegito pri informado : Sro LEROUX, Komisaro pri la kontoj Sro NOBIS, Delegito de la gejunuloj : Sro Gilbert BETTENCOURT, Membroj : Finoj Ghislaine VIOLETTE kaj Marie Claude GERVAIS.

2 kursoj regule funkcias en la Junuldomo kun 1 lernanto ĉiumarde je la 20h30 kaj perfektiga kurso (preparado al la Atesto pri Kapableco) kun 2 lernantoj ĉiuĵaŭde je la 17a horo.

Sro HIS kaj Sro POTTIER sukcesis renkonti la sekretarion de la loka deputi--to, kiu montriĝis tre interesata kaj faris multajn demandojn pri Esperanto. Ili transdonis al li leteron de la grupo al la deputito, Sro FOSSE, pri la leĝopropono koncerne la instru--adon de Esperanto en la lernejoj.

Laŭ raporto de Sro POTTIER.

## GRAND QUEVILLY

En la kadro de la loka laika amikaro "Bastié Calmet--te Salengro" okazas ĉiumerkrede daŭriga kurso gvidata de Sro QUILLAUD.

## NORMANDA FEDERACIO de U.F.E.


En la lasta cirkulero (Normanda Stelo n°8a) de la Normanda Federacio de U.F.E. ni povis legi interesajn artikolojn de Fino Marie Christine GOT kaj de Sro TALPIED pri la sukcesplena Kopenhaga kongreso de U.E.A. (26/7- 2/8 -75). Dum 1975 la Federacio havis 3 membrojn en Calvados, 36 en Eure, 2 en Orne kaj 19 en Seine Maritime : do entute 60 membrojn.
La venonta konsilia kunveno okazos la 25an de januaro je la 10a horo en GRAND QUEVILLY. Rendevuo 14 rue Thiers."Iu ajn povas ĉeesti la kunvenon kiel observanto."

Revivi en la penso la filmon de nia mallonga ,sed interesa vojaĝo,estas tute facila. Ne estas la sama afero kiam oni devas skribi siajn memoraĵojn.

Vendreo, la 3an de Oktobro, ĉiuj partoprenantoj estis ĉe la rendevuo.
La ŝipo ne estis ankoraŭ alveninta. Interbabilado estis tre aktiva en la atendejo,kie kelkaj geamikoj ,ne vojaĝantaj,akompanis nin ĝis la foriro .
Kun malfruo ni enŝipiĝis . Multaj vojaĝantoj . Feliĉe ni antaŭe rezervis ripozseĝojn . Atendante la forirmomenton, ni rigardis, de sur la ferdeko, la enŝipiĝadon de multaj aŭtomobiloj kaj ŝarĝaŭtoj .Nekredebla trafiko !
Fine, la foriro, kaj ĉiu retrovas sian seĝon .Ni ne dormis trankvile ĉar, de tempo al tempo,anoncistino parolis en nekompreneblaj vortoj kiuj finis per " sankju veri maŝ "....
Dank'al rapida irado, la ŝipo regajnis sur sia malfruo. Jam malproksime vidiĝis lumoturo kaj lumoj marbordaj.Baldaŭ la ŝipo eniras la ŝanelon.
Jen Southampton, elŝipiĝo.Niaj gastigantoj akceptas nin...
Ĉiu el ni estas kondukata hejmen, de nia respektiva gasto. Mia gastiganto estas 84 jara , kiel mi emerito kaj vidvo kaj ankoraŭ rapidmova.
Kune, post tualetado , ni matenmanĝis ,kaj parolis, parolis,nur uzante Esperanton, ĉar li lerte parolas . Atendante iun Sinjorinon kiu devis serĉi nin por iri al la Urbodomo, ni ludis je domenoj : ili estas kuriozaĵ ; pli grandaj ol kutime,ĉiu punkto havas specialan koloron.
Je la 11a horo, ni estis akceptitaj de S-ino Pugh, urbestrino.
Rapide, oni opinias ke ŝi estas vere simpatia,tute simpla ; eĉ ŝi parolis en Esperanto por saluti nin ! Oni vizitis diversajn ĉambregojn . Ni eksidis en la brakseĝoj de la Konsilantara Salonego. La urbestrino vestis sin per la soleneca mantelo ruĝa . La tempo fluis tiel rapide ,ke estis pli ol tagmezo kiam ni foriris el la urbodomo .
Piede, ni iris al la Technika Kolegio por komuna tagmanĝo. Rapide la etoso estiĝis amika; mi sidis apud S-ino Lucas kaj anglaj sinjorinoj.Bona konversacio en Esperanto komprenebla . Rimarko pri la aranĝo de la manĝo : saŭco de mento kun la viando, se vi deziras .... kaj oni servas deserton antaŭ la fromaĝo : Mi ne kredas ke la francaj amikoj aprezis tion...
Post la manĝo ,promenado piede sub gvidado de la prezidanto A.Diaz precipe en la malnova urbo kiu antaŭe nomiĝis " Hampton " Vizito tre interesa .
Per aŭtobuso ni alvenis ĉe S-ino Hopkins kie ni retrovis aliajn samideanojn ; ĉi tie ni trinkis la tradician teon ,kun kukoj .
Poste ni iris al la Klubo de la Esperantistoj por amika distra Vespero . Oni multe parolis kaj kantis, kaj ni povas estis fieraj pri la prezentado de nia Grupano S-ro Laney : ni dankegas lin !
Je la dudekdua, la festo estas finita. Oni rekondukas nin aŭtomobile. Tago plenplena je okupoj ... Bonan nokton .
Dimanĉo matene, post matenmanĝo kun S-ro Himens, mia gastiganto, ni piede vizitas la " Civic Center " Tie troviĝas ĉiuj utilaj oficejoj,kliniko, fajrobrigado, policejo ,domo por maljunaj personoj. Oportuna aranĝo.
Reveno hejmen . Iom da domenoludo ,parolante. Kaj mia amiko Georgo preparis la tagmanĝon .
Kaj ve! ni devas foriri . Je la 14a ĉiuj retrovĝas ĉe la kajo .
Estas la fino de la vizito : ĉiuj adiaŭs sin reciproke ... dum longa , longa tempo, ili restis ĉe la ŝipo ... mi tre ŝatis iliajn gestojn.
Lameiro estis bona, kun malpli da vojaĝantoj ol dum la iro .Bedaŭrinde, kelkaj iom malsanis ...
Jen Le Havre ... Kelkaj geamikoj nin atendas ..."Bone vojaĝis ? "
"Jes ni bone vojaĝis , bedaŭrante ke la vojaĝo estis tro mallonga ! "

Kaj tiu vojaĝo ankoraŭ pruvis al ni mem ke ni kapablas interkompreniĝi bone uzante nur Esperanton kun eksterlandanoj

Roberto LETAILLEUX



# U.E.A. DELEGITOJ

Laŭ la JARLIBRO de U.E.A. 1975a
(Nepre utila manlibro de la vera esperantisto)

| | | |
|---|---|---|
| – 76 – BOISGUILLAUME. | Sro JOUIS | Fakdelegito pri Scienco. |
| – 14 – CAEN. | Sro ROUSSEAU | Delegito. |
| – 61 – DOMFRONT. | Sro VERON | Fakdelegito pri Aerodromoj.<br>Delegito.<br>Fakdelegito pri Historio.<br>Juro.<br>Religio Katolika. |
| – 76 – LE HAVRE. | Sro GIBAUX<br>Sro CHAIM | Delegito.<br>Fakdelegito pri Informado. |
| – 27 – LES ANDELYS. | Sino VINCENT | Delegitino.<br>Fakdelegitino pri Instruado.<br>"Mensa".<br>Religio Katolika. |
| | Fino BONNET Sylvie | Junuldelegitino.<br>Fakdelegitino pri Teatro. |
| – 14 – LISIEUX. | Sro MARTIN | Delegito. |
| – 76 – MONT SAINT AIGNAN. | Dro BERLOT | Fakdelegito pri Medicino. |
| – 76 – ROUEN. | Sro JOUIS<br>Sro LOISEL | Fakdelegito pri Scienco.<br>Fakdelegito pri Fervojoj. |
| – 76 – SAINT AUBIN LES ELBEUF. | Sro CHAMARET | Fakdelegito pri Aŭtomobiloj. |
| – 14 – TROUVILLE SUR MER. | Sro TALPIED | Delegito. |
| – 76 – YVETOT. | Sro POTTIER | Delegito.<br>Fakdelegito pri Instruado. |

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

PERLITERAJ OPERACIOJ !

Anstataŭigi ĉiun literon per cifero.
(La sama cifero por la sama litero.),
utiligante ĉiujn ciferojn de 0 ĝis 9,
tiel ke la divido estu vera.

```
ÑAZO | ZU          ORIO | LO
     |----              |----
ENZ  | AAH         FII  | ILO
 AMO |              FRO |
  EE |               BB |
```

nek 5, nek 9.
Plie : A + Z = N

nek 3 5 8 aŭ 9
I + O = R

SOLVO de la perlitera operacio kiu aperis en la lasta numero de N.E.N.

```
    2 [illegible] I [illegible] 2 7
  [illegible] I [illegible] [illegible] 0 7
  ----------------
  I 0 9 [illegible] 5 3 4
```

# DISTRA ANGULO

En monduma kunveno, la profesoro montras siajn konojn :
" Niaj piedoj restadas sur la tero dank'al la leĝo pri gravito ...."
" Sed – demandis sciivolulino – kio okazis kiam la leĝo ne estis ankoraŭ voĉdonita ? "

=-=-=-=-=-=

Du amikinoj rigardadas la junan knabon. La patrino diras :
" Li havas la okulojn de sia patro. "
" Kaj la belan rideton de sia patrino " susuras la amikino.
Sed Eriko ne tre ŝatas tiajn rimarkojn !
Li vigle aldonas :
" Mi ankaŭ havas la malnovan kuloton de mia frato ! "

=-=-=-=-=-=

"Manoj supre ! Ĉiuj kontraŭ la muro !"
La gangstero ĵus penetris en la bank-halon. Li proksimiĝis al la kasisto, kaj krias :
" La monon tuj, aŭ vi mortos !"
Sed la kasisto prezentas antaŭpreperitan paperon. La mirigita krimulo legas
" Rektigu vian kravaton. La fotografado tuj okazos ! "

**ne forgesu vian jaran kotizon al U.N.E**
**5,00 Fr. minimume. Dankon !**
**c.c.p. : Rouen 283 40 H**

1a LISTO

# TURISMA KALENDARO 1976

Planu jam viajn venontajn feriojn, kaj elektu !

| | | | |
|---|---|---|---|
| JANUARO | + 17 – 31 | AŬSTRIO : 3a Internacia Esp. Vintra Feriado. Vieno. | 1 |
| FEBRUARO | + 8 – 13 | HISPANIO : 17a Int. Fervojista Esp. Skisemajno. La Molina. | 2 |
| MARTO | + 14 | FRANCIO : Regiona renkonto. Centro-Okcidenta Federacio de UFE en Saumur. | 3 |
| | + 21 | FRANCIO : Ĝenerala Kunveno Normanda Federacio UFE. Caen | 4 |
| | + 21 – 4/4 | FRANCIO : Grésillon : Printempa restado. | 5 |
| APRILO | + 11 | FRANCIO : Ĝenerala Kunveno de F. E. T. en Parizo. | 6 |
| | + 12 – 17 | OKC. GERMANIO : 18a Eŭropa Semajno. Buchenbach bei Frei- -burg. | 7 |
| | + 16 – 19 | NEDERLANDO : Eŭropa Esp. Kongreso. Eindhoven. | 8 |
| | + 16 – 20 | FRANCIO : 68a Kongreso de U.F.E. La Grande Motte. | 9 |
| | + 17 – 20 | FRANCIO : 31a SAT-Amikara Kongreso apud Bordeaux. | 10 |
| MAJO | + 1 – 2 | BELGIO : Printempa Renkontiĝo de la Francaj E° Fervojistoj. | 11 |
| JUNIO | + 5 – 7 | OKC. GERMANIO : Kongreso de la Germanaj Esperantistoj. | 12 |
| | + 12 – 18 | SVEDIO : 28a I.F.E.F. Kongreso. Skelleftea. Fervojistoj | 13 |
| | + 25 – 27 | HUNGARIO : Hungarlanda Kongreso en Komló. | 14 |
| JULIO | + 1 – 4 | KANADO : 18a Kongreso Kanada Esp. Asocio. Toronto. | 15 |
| | + 15 – 18 | BRAZILO : 11a Brazila Seminario en Brazilio. | 16 |
| | + 2 – 22 | FRANCIO : Grésillon : Esperantistaj Semajnoj. | 17 |
| | + 15 – 30 | JUGOSLAVIO : Someraj Universitataj Semajnoj. Primošten | 18 |
| | + 18 – 24 | DANIO : Internaciaj Feriaj Kursoj en Helsingör. | 19 |
| | + 20 – 27 | FRANCIO : 28a Kongreso de K.E.L.I. Montpellier. | 20 |
| | + 22 – 25 | USONO : Usona Kongreso en Sanfrancisko. | 21 |
| | + 23 – 12/8 | FRANCIO : Grésillon : Internaciaj Semajnoj. | 22 |
| | + 28 – 30 | JUGOSLAVIO : 20a kongreso Jugoslaviaj Esperantistoj. Prilep. | 23 |
| | + 31 – 7/8 | GREKLANDO : 61a U.K. de U.E.A. en Ateno. | 24 |
| | + 24 – 31 | SVEDIO : 49a SAT Kongreso en Gotenburg. | 25 |
| AŬGUSTO | + 8 – 29 | BELGIO : 3a Sesio de Someraj Universitataj Kursoj en Antverpeno | 26 |
| | + 13 – 2/9 | FRANCIO : Grésillon : Studsemajnoj. | 27 |
| SEPTEMBRO | + 6 – 19 | POLLANDO : Ora Pola Aŭtuno. Miedzygorze. | 28 |
| | + 12 – 16 | SVISIO : 17a Eŭropa Semajno en Lugano. | 29 |
| | + 18 – 24 | ITALIO : 47a Kongreso Itala E° Federacio en Massa. | 30 |
| OKTOBRO | + 10 – 12 | OKC. GERMANIO : 19a Jarkunveno de Germana Esp. Fervojista Asocio en Treuchtlingen. Bavario. | 31 |

AGRABLAJN FERIOJN ! Aliaj listoj sekvos en la venontaj numeroj de Normanda E° Bulteno.

:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:

# ZAMENHOFA RENKONTIĜO

Spite la nefavora "malvarma" vetero, la 13/14an de decembro 75, 42 esperan--tistoj kaj kelkaj infanoj kunvenis en la Junulgastejo de SAINT VALERY EN CAUX (76) por digne sed fratece festi kun bona humoro la naskiĝan datrevenon de Zamenhof.

Jam geamikoj el GRAND QUEVILLY, LE HAVRE, ROUEN, YVETOT, LISIEUX sabaton posttagmeze alvenis. Pluraj el ili ne revenis hejmen por tranokti kaj bonhumore invadis la tutan Junulgastejon, kiu tiutempe estis fermita pro la nefavora turista sezono.

Sed la junulgasteja "patro" tre afable kaj sindoneme pruntedonis la tutan Domon al ni, kaj eĉ revenis el la Lazura Marbordo tute speciale, por zorgi pri la hej--tado kaj malfermi la Domon al ni !

Infanoj kaj gejunuloj tuj komencis ĉu aŭdi sonbendojn ĉu kart- aŭ ŝak-ludi. Dum la tuta restado, la partoprenintoj povis tute libere foliumi pli ol 200 esperanto-librojn, ĉar ne forgesu ke la 15a de decembro estas por la esperantista popolo : "la Libro - Tago ", kaj legi plurajn dekojn da diversaj E°-revuoj.

Vespere ĉiuj ĉirkaŭ la kameno de la kunvenejo gaje manĝis, kaj pli poste rigardis projekciaĵon de diapozitivoj faritaj dum la SAT kongreso en Toronto (Kanado), aŭ vizitis per lumbildoj la mirindan regionon de la departemento Ardèche kaj revidi fotojn de la lasta kunveno en Val de Saane.

La etoso plivarmiĝis kiam Pascal POTTIER kaj lia amiko Pascal, per gitaroj kantigis ĉiujn ĝis malfrua horo.

Dimanĉe matene, novaj geamikoj el YVETOT, PAVILLY, BOUVILLE, LE HAVRE, ROUEN, GD QUEVILLY, FECAMP, BOISGUILLAUME, por brue babiladi kun la "malnovaj junulgast--ejanoj". Kelkaj, malgraŭ la ekstera malvarmeco promenadis en la malgranda sed bela urbeto. Antaŭ ol komune tagmanĝi, pli ol 45 personoj plenigis la salonon, kiam nia prezidanto Sro QUILLAUD rememorigis al ni detalojn pri la vivo de Zamenhof. Dank'al la afabla sindonemo de esperantistinoj, ni povis festeni post Yvetot'a aperitivo.

Poste ni denove arigis la seĝojn por ĝui tre amuzan teatraĵeton majstre luditan de la Havra grupo, por komune kantadi dank'al la gitaroj kaj agrablaj voĉoj de la Yvetot'anoj, por aŭskulti spritaĵojn, poeziaĵojn kaj amuzan novelon de Maupassant, por vidi filmojn kiujn prezentis nia amiko JOUVIN.

Bedaŭrinde, ni devis disiĝi fine de la posttagmezo, sed tiu semajnfino sen pompa programo, dank'al la gajeco kaj sindonemo de ĉiu,permesis al ĉiu partoprenanto agrable pasigi tempon.

Ni deziras ĉi tie tute speciale danki unue la neesperantista "prizorganto" de la Junulgastejo, kiu faris ĉion, kion li povis por helpi nin, la Yvetot'an grupon kaj tute speciale familion POTTIER, kiu arte plenigis la varietean vesperon kaj posttagmezon, la teatran grupon de LE HAVRE kun familioj GIBAUX kaj CARON por la majstre prezentita teatraĵeto, ĉiujn kuiristinojn kiuj regalis nin dum la dimanĉa tagmanĝo; fine, ni danku ĉiujn partoprenintojn, kiuj permesis ke tiu modesta festeto estu sukcesa laŭ ĉiuj vid--punktoj. Pro tiuj sukcesoj en Val de Saane kaj en St Valéry, nepre ni tutsame en simpla kaj gaja etoso rekomencu ĉi-jare !

Peĉjo.

:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:

## Esperantistaj Asocioj

I . E . K . A . : Kio estas tio ?

estas la Internacia Esperanto Klubo Aŭtomobilista.

- Ĝi celas solvi la ligvan problemon en aŭtomo-bilistaj medioj, kaj atingas preskaŭ 1.000 membrojn el dudeko da landoj.
- Fakuloj laboras super faka terminaro pri aŭ--tomobilo.
- Jam oni povas ricevi senpage aŭto-turisman vortareton en E° kaj kvin aliaj lingvoj : ĝin mendu ĉe FIAT - Direzione Publicità - Corso Marconi 10, 10125 TORINO. ITALIO.

Membreco dumviva kostas 7,00 Fr. :
ĝin sendu al Sro J. GUILLAUME,
66 de Grasse Village,
78810 Feucherolles.
P.ĉ.k. : 18 99 91 T.


:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:


## Arkivoj

Sekve de nia alvoko pri " Arkivoj " ĉe la frontpaĝo de la lasta numero de nia Bulteno, ni jam ricevis dokumen--tojn kaj proponojn el diversaj lokoj. Ni kaptas la okazon, por ĉi tie danki tutkore Sron JOUIS, Sron LEGRET Sron GIBAUX, Sinon VOLPELIERE........

Dankon al ili !

# Ni rakontas pri ... Rothomagus !




ROLLON strebis por interdigigi kaj bridi la fluen de la rivere en Rouen. Iom post iom, dank'al la favera geografia pozicie, la urbe ĉiam pli preperis.

La konatece de ĝiaj fajencfabrikaĵoj, teksaĵej kaj drapfabrikej rondiris la monden. Antaŭ la mondmilito ( 39-45 ) la havene, pro la potence de ties komerce, fariĝis la unua mara kaj rivera havene el Francie.

La elvolviĝado intelekta de Rouen estis aŭtoritate ampleksa dank'al CORNEILLE dramverkisto, FLAUBERT famkonata verkisto, FONTENELLE filozofo kaj POUCHET natursciencisto.

Guy de la BROSSE botanikisto, kreinto de la naturĝardeno el Parizo. La konataj pentristoj kiel JOUVENET kaj GERICAULT, la muzikisto BOIELDIEU, aŭtoro de " Kalifo el Bagdad ".

La fisikisto DULONG konstrinto de la manometro kaj la fama kuracisto Jacques DAVIEL kiu, la unua, sin riski operacii katarakton de la okuloj.

Ni ne forgesu CAVELIER de la SALLE granda mondvojaĝanto kiu eltrovis novan terparton nomigitan LOUISIANE, kaj ankaŭ Metiistoj kiel Masseot ABAQUESNE kiu fabrikis fajencon antaŭ Bernard Paliŝsy kaj multnombrajn Arkitektojn kies la valoro hodiaŭ ne estas kontestebla vidante la starigitajn monumentojn religiajn aŭ laikajn.




<u>Ĉefaj laikaj monumentoj.</u> Juĝpalaco - Belfrido - Palaco Bourgtheroulde - Kastelturo - Placo de la malnova merkato - Monaĥejo sankta Maklu - la Financhotelo (antaŭ la katedralo) sidejo de la turismoficejo - la Urbdomo malnova (strato Gros-Horloge). Ekzistas ankoraŭ multaj fontanoj-monumentoj kaj statuoj.

<u>Muzeoj.</u> Vidindaj estas : pentraĵo - naturaĵo kaj forĝitaj feraĵoj.

<u>Religiaj monumentoj.</u> Inter ili : Katedralo - Abatejo sankta OUEN - sankta Maklu kaj lia tombejo - preĝejo sankta Patrice - sankta Godard, k.t.p. ...




## VIZITI ROUEN, ESTAS FACILA

PIEDIRANTE ĈAR ĈIUJ MONUMENTOJ ESTAS TRE APUDAJ !

Kompilita el FoGo

( daŭrigota )

# Jaraj Kotizoj 1976

- UNUIĜO de la NORMANDAJ ESPERANTISTOJ : minimume 5,00 Fr. Subtenkotizo ekde 10,00 Fr.
  Union des esperantistes de Normandie : c.c.p. 283 40 H. Rouen.
- FEDERATION NORMANDE des CENTRES CULTURELS ESPERANTO : (Normanda Federacio de U.F.E.)
  ~~c.c.p. Rouen 2348 06 C~~

E° lernantoj malpli ol 16 jaraj
kondiĉe ke la kurso aŭ grupo pagu kotizon (b) : 5,00 Fr.

| | malpli ol 22 jara. | Pli ol 22 jara. |
|---|---|---|
| (a) : membro karto UFE/UEA + E° Actualités + Normanda Stelo | 15,00 Fr | 15,oo Fr |
| (b) : kiel (a) + Revue Française d'E°. | 46,00 Fr | 66,oo Fr |
| (c) : kiel (b) + Jarlibro de U.E.A. | 68,oo Fr | 110,oo Fr |
| (d) : kiel (c) + Esperanto revuo. | 112,oo Fr | 154,oo Fr |

- SAT - AMIKARO : (Travailleurs esp. des pays de langue française.)
  Membreco / abono al la revuo : 28,00 Fr : André Sadier 22 Avenue P.V. Couturier Bât. N.D. 93000 Bobigny. c.c.p. : 7658 05 C Paris.
- SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (S.A.T.) : SAT 67 Avenue Gambetta 75020 Paris.
  Membreco kun organo "Sennaciulo" kaj jarlibro : 50,oo Fr. Abono al Sennacieca Revuo 10,oo Fr
  C.c.p. Paris 1234 22.
- FEDERATION ESPERANTISTE du TRAVAIL : (F.E.T.)
  15,oo Fr F.E.T. 179 rue Ordener 75018 Paris c.c.p. Paris 902 52.
  Abono al Paco gazeto de Mondpaca Esperantista Movado.
- ASSOCIATION FRANCAISE des CHEMINOTS ESPERANTISTES. 1 bis rue d'Athènes 75009 Paris.
  c.c.p. 7402 60 L Paris. Membre actif : 20,oo Fr Retraité : 15,oo Fr.
  Famille par personne : 5,oo Fr.
  Abonnement seul à Esperanto Fervojisto : 10,oo Fr.

# Abonoj

Kion legi dum la jaro ? jen kelkaj abonoj por 1976 :

Pagu la abonojn pere de U.F.E. 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris c.c.p. Paris : 855 35.

- Kulturaj Kajeroj (Cahiers de Grésillon): 25,00
- Juna Amiko. Trimonata revuo por junuloj: 7,50
- Esperanto revuo de UEA : 66,00
- Kontakto . Trimonata revuo por junuloj : 23,00
- Internacia Pedagogia Revuo : 14,00
- El Popola Ĉinio 1 jaro : 10,oo - 2 jaroj 15,00 - 3 jaroj 20,00
- Monda Karuselo : 10,00
- CED Dokumentoj : 15,00
- Europa Dokumentaro : 24,00
- Monda Lingvo Problemo : 55,00
- Espéranto Informations (en Français) : 15,00
- Scienca Revuo : 25,00
- HEroldo de Esperanto : 45,00
- Homo kaj Kosmo : 9,00
- Literatura Foiro : 14,00
- Oomoto (japana revuo) : 24,oo
- Hungara Vivo : 25,00
- Dia Regno : 25,00
- Biblia Revuo : 30,00
- Brita Esperantisto : 30,00
- Franca Katolika Esperantisto: 8,00
- Espero Katolika (kun aliĝo al I.K.U.E.) : 27,00

---

- Koncize : bulteno de la Europaj gejunuloj : 10,00 Fr (JEFO, c.c.p. 31709 94 La Source)
- Kalejdoskopo : porgeknaba gazeto de SAT : 5,00 Fr ( tra la SAT c.c.p.)
- La Juna Penso : SAT - Junulfako. 15,00 Fr (La Juna Penso c.c.p. 34 268 70 La Source
- Universala Ligo : membreco kun la bulteno : 5,00 nederlandaj Guldenoj aŭ 20 Steloj
  nederlanda c.c.p. Den Haag : 40 88 26.
  Universala ligo : Postbus 334, BUSSUM 1351 - Nederlando.

BONAN LEGADON !